# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 2
februaro 1989

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Monique Caestecker, Kerkstraat 66, B-9940 Sleidinge.

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprez., Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

**KOMISIONOJ**

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

## FEL-Studotago

Je 4 februaro 1989 okazis tuttaga FEL-studotago pri instruado de Esperanto. En la programo estis jenaj tri proponoj, kiujn ni pritraktis kaj voĉdonis:

- instruplanoj por la diversgradaj kursoj kaj minimuna ekzameno por baza kurso;
- ekzameno kaj rekono de Esperanto-instruistoj agnoskitaj de FEL;
- kurso-kostoj kaj pago de la instruistoj.

Ĉeestis 24 personoj:
Marcel Aerts, Jean-Pierre Allewaert, Albert Boon, Audrey Childs-Mee, André Coppé, Lucien De Sutter, Chris Declerck, Marcel Delforge, Ivo Durwael, Hélene Flak, Marie Grela, Jan Hanssens, Alex Humet, Katja Lödör, Ludo Schelstraete, Raymond Steenhout, Eduard Symoens, Kiki Tytgat, Guido Van Damme, Mila Van den Horst-Kolinka, Marc Van den Bempt, Raymond Wylleman, Roland Rotsaert.

Senkulpigis sin:
An kaj Manuel Alberto, Petro De Smedt, Rik De Roover, Hugo Dossche, Gerrit Gerritsen (Nl), Patrick Haerick, Iwona Kocieba, Paul Peeraerts, Germain Pirlot, Andre Staes, Emile Van Damme.

**ENKONDUKO**

Enkondukis s-ro Ivo Durwael, prezidanto de FEL. Laŭ lia konstato propagando estas grava afero kaj malfacila tasko, des pli se mankas strukturoj. Same estas pri instruado: necesas motivigi lernantojn, kaj kontenta lernanto estas plej bona propagandisto, sed malkontenta lernanto povas ruinigi laboron de pluraj jaroj. Tial ni bezonas pli bone strukturigi kaj unuecigi la instrupenojn.
La celo de la studotago do estas: 1) Pripensi la bazan enhavon de kursoj diversnivelaj; 2) Transdoni spertojn tiel ke ankaŭ ĉestontaj instruistoj povu uzi ilin; 3) Starigi minimumajn normojn (por Flandrujo) por disdonado de "diplomoj". (Kompreneble aliaj povus uzi niajn rezultojn laŭ siaj bonvoloj.)

**LA DISKUTOJ**

Ilin gvidis Alex Humet. Li komence esprimis dankon al tiuj (eĉ neĉeestantaj) kiuj sendis raportetojn, proponojn ktp. ĉar tiuj enhavis utilajn elementojn.
La programo estu:
- antaŭtagmeze priparolado de teknikaj aferoj kaj la tri proponoj de FEL-estraro;
- posttagmeze gruplaboroj pri: tipaj problemoj de Esperanto-instruado; prijuĝo de Esperantaj instru-libroj; asisto al nov-bakitaj instruantoj.

MATENO

*Propono 1:*

Ni konstatis ke ekzistas du tipoj da kursoj Esperantaj:
- rapidkurso
- baza kurso

Rapidkurso: daŭru pli-malpli 14 horojn (sistemo Auld, De Smedt); celo estas konatigi homojn kun la fenomeno Esperanto kaj motivigi ilin plue lerni la lingvon;
ĝi celas nur lingvo-spertulojn. Kvankam post la kurso ili scipovetas Esperanton, ilia kono ne estas internigita kaj rapide malaperos;
la rezulto estu ke partoprenantoj aliĝu al baza aŭ progresiga Esperanto-kurso kaj mem propagandu la lingvon.

Baza kurso: daŭru pli longe (inter 30 kaj 60 horojn - ne gravas ĉu temas pri "veraj" aŭ nur "lernejaj" horoj), plej gravaj estas la instru-unuoj kiuj dependas de la lernantoj, la instruisto kaj la metodo aŭ lernolibro.
dum ĝi lernantoj akiru vortprovizon de 1000 vortoj (listo de *Kontakto*); la bazan gramatikon (la finaĵoj, tabelvortoj,...) necesa por simplaj, ĉiutagaj temoj; bonan esprimkapablon tiel ke la lernantoj post la kurso memfide parolu laŭ akceptebla ritmo.
ĝi finiĝu per ekzameno kiu havu almenaŭ buŝan parton kun ĉeesto de ĵurio kiu libere demandas dum la lernanto respondas.
ĝi estu honorigita per FEL-diplomo (sed kompreneble nur se la kurso respondas al ĉiuj agnoskitaj kriterioj).

(Sekvas tiun ĉi punkton diskuto pri diplomoj. Kiun valoron havas la FEL-diplomo. Nu, tiu valoro estas tute relativa, ne temas pri ŝtata rekono - estis proponite ke FEL klopodu informiĝi pri ŝtata rekono, sed almenaŭ kursoj okazantaj laŭ
FEL-kriterioj povus ricevi FEL-subtenon, ĉu materian, ĉu financan. Same nur homoj kiuj havas de FEL-agnoskitan diplomon, povos estiĝi agnoskitaj FEL-instruistoj.
Intervenis ankaŭ Eduard Symoens kiu parolis pri la ILEI-ekzamenoj, kriterioj, agnoskigo de instruistoj, ktp....)
Pri tiu ĉi punkto vidu sube el la letero de E. Symoens.

Ivo Durwael atentigis la ĉeestantaron ke la celo de la studotago ne estis krei rigidajn normojn sed ja difini trakojn, komuniki spertojn, tiel ke novaj instruistoj respondu al bazaj kriterioj kaj se la kursoj havu bonan nivelon, tiel ke ne okazu katastrofoj (forkuro de lernantoj, kontraŭpropagando...)
Plej grave estas ke FEL malkuraĝigu finlernantojn de baza kurso starigi propran kurson.

Same lernantoj devus scii ke ili sekvas bazan kurson kaj ke poste eblas profundigi la lingvan konon en kurso de pli alta nivelo.

Post voĉdonado estis akceptita la sekvanta:

*Propono 1:* *kursoj en Flandrujo*
*Rapidkurso: 14 horojn - konatiĝo;*
*Baza kurso: 30 ĝis 60 horojn, dividebla en ŝtupoj - 2 aŭ 3 - sed oni antaŭvidu de la komenco ankaŭ iri ĝis la lasta ŝtupo!*
*Minimuma kono de 500 ĝis 1000 plej oftaj radikoj; la tuta gramatiko necesa por akiri bonan esprimpovon por simplaj, ĉiutagaj bezonoj.*
*Nepras buŝa ekzameno kun ĉeesto de "kvalifikita" instruisto.*
*La lernantoj ricevos FEL-diplomon.*

*Propono 2:*

Temas pri la nocio "kvalifikita" instruisto.

La propono validas nur por novaj instruistoj. Estis ĝenerale akceptite ke homoj kiuj jam dum jaroj gvidas kurson estas "spertaj" kaj rajtas do nomi sin "kvalifikitaj"; ekde nun novaj instruistoj kiuj volas instrui en de FEL akceptita kurso nepre bezonas diplomon.

Listo de "kvalifikitaj" instruistoj:
Petro De Smedt, Emile Van Damme, Ludo Schelstraete, Chris Declerck, André Staes, Alex Humet, Fernand Roose, Hél`ene Falk, Albert Claessen, Rik De Roover, Patrick haerick, Manuel Alberto, Carl Deseure, Lucien De Sutter, Marcel Aerts, Ivo Durwael, Marc Van den Bempt, Kiki Tytgat, Katja Lödör, René Budts, Jean-Pierre Allewaert, Albert Boon, Jan Hanssens. (Listo de valonaj instruistoj troviĝas je la fino de la raporto.)

Triopo el tiu ĉi listo povas formi ekzamenkomisionon.

Post voĉdonado estis akceptita la sekvanta:

*Propono 2:* *validas por novaj kandidatoj-instruistoj - ekzameno antaŭ tri agnoskitaj instruistoj;*
*- pruvi la konon de baza kurso;*
*- pruvi fluon de la parolo;*
*- kompano de "rekonita" instruisto dum 1 baza kurso. Tiu akompano dependas de pedagogia diplomo aŭ sperto. Kiam temas pri ne-instruisto, la ĉeesto de spertulo nepre necesas.*

Ĉar FEL ne disponas pri rimedoj organizi porinstruistan kurson, estas rekomendite ke kandidatoj sekvu oficialan D-kurson kaj tiel ekhavas diplomon. La estraro ja pristudas la eblecojn fojfoje organizi porinstruistajn studotagojn kaj invitos spertajn instruistojn (Denis Keefe, Audrey Childs-Mee) ktp.

*Propono 3:*

Temas pri kosto de kursoj kaj salajro de instruistoj. Elirpunkto estas: kvankam la movado baziĝas sur bonvola idealismo de la gemembroj, tamen kursgvidantoj rajtus ricevi pagon, unuavice ĉar en nia mondo oni bezonas mono por vivi, due, ĉar pago ankaŭ devigas la instruisto al regula kaj konscienca instruado.


"Stafeto"-serio prezentas:



Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas

**Manjo Austin**

Kiam denove edziniĝas ŝia patrino kaj ili translokiĝas al nova hejmo, malfermiĝas por Maureen nekonata mondo plene de novaj samfamilianoj. Ekiro en la profesian vivon eĉ pli malfaciligas la ŝanĝon. En rakonto, kiu sursceniĝas en irlanda ĉirkaŭajo, ni sekvas ŝian kreskon al adolteco.

**Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas** 128 p., 330 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



"Stafeto"-serio prezentas:




**murdo**
**en esperantujo**


**Daniel Moirand**

Kviete fluetas la kluba vespero, kiam subite malfermiĝas la pordo kaj envenas nekonata viro. Kiam li atingas la tablon, li teren kolapsas. Morta!...
Pro tiu okazajo leŭtenanto William Hammerkopf eniras la Esperanto-mondon. Ĉu li trovos tie nur morton kaj pereon?

**Murdo en Esperantujo.** 156 paĝoj, 390 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



"Stafeto"-serio prezentas:



*Beletro,*
*sed ne el katedro*

*Gaston Waringhien*

Ĉu vere ekzistas esperanta literaturo? Ĉu eĉ ekzistas esperanta literaturscienco?
La nestoro de l' esperantaj literatur-istoj instruos, en agrabla, klara, prilaborita stilo, pri la atingajoj de esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Fakte temas pri simplaj klarigoj de altnivelaj artaj rezultoj.

**Beletro, sed ne el katedro:** (reviziita eldono de *Eseoj* I) 263 p., 630 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Tamen, ĉar la financa situacio de ĉiuj kurso-organizantoj kaj lernantoj estas malsamaj, temas nur pri rekomendoj adaptendaj laŭ cirkonstancoj.

Post voĉdonado estis akceptita la sekvanta:

*Propono 3:* *- Rekomendo pri financo de kursoj (kosto kaj pago)*
*- Rapidkurso: 1000 fr., inkluzive de materialo;*
*- Baza kurso: 3000 fr., inkluzive de materialo;*
*- Por la kursgvidanto: pago de po 250 fr. hore.*
*- La cetero por la organizanto (luo, propagando, administrado...)*

Ni atentigas la legantoj ke la prezo de baza kurso estas pli alta ol tiu de oficialaj lingvo-kursoj kaj ke do kandidatoj prefere iros al tiuj kursoj; tamen, niaj kursoj estas la nuraj Esperanto-kursoj, do la nura ebleco lerni Esperanton; due, oficialaj kursoj estas forte subvenciataj. Tio ne eblas por la de FEL aŭ la lokaj grupoj organizitaj kursoj.

<u>POSTAGMEZO</u>

**Laborgrupoj:** (Ni protokolas la konkludojn de la tri laborgrupoj. Interkrampe estas komentoj kiuj okazis dum la pleno).

*Grupo 1:* *gvidis Ludo Schelstraete*
*partoprenis M. Delforge, A. Coppé, Marie Grela.*
*temo:* tipaj problemoj de Esperanto-instruado

<u>Propagando:</u> afiŝoj estas perdita mono, se ili ne estas modernaj kaj trafaj; plej bone estus desegnaĵo aŭ foto kun eta teksto. (AH: La afiŝoj de FEL estas apenaŭ uzataj).
<u>Artikoletoj</u>: Regula aperigado de artikoletoj en la plej bone pririgardataj gazetoj. (GvD: Tamen ni ne troigu kaj ni nur petu publikigon de vere interesaj novaĵoj).
<u>Malĉeesto:</u> tiuj, kiuj forestas el la kurso estu rekontaktataj diskrete.
<u>Lernolibro</u>: La instruanto elektu la libron per kiu li pli bone povas labori.
<u>Ekzercoj</u>: Ekzercoj pri la instruitaj eroj ni <u>tre</u> bezonas.
<u>Hejmtaskoj</u>: Ne tro, sed regule.
<u>Bendoj</u>: Bezonataj por aŭdi aliajn voĉojn.
<u>Legotekstoj</u>: precipe en la komenco. Mem fari.
<u>Motivigo</u>: Ni devas doni praktikan motivon por lerni Esperanton.
<u>Skriba kurso</u>: Ni devus serĉi eblecojn por interkomunikigi la lernantojn de skribaj kursoj.
<u>Memlernantoj</u>: Ili ankaŭ rajtu trapasi la ekzamenojn.

*Grupo 2:* *Gvidis Alex Humet*
*partoprenis: M. Aerts, J.P. Allewaert, Bert Boon, Ch. Declerck, J. Hanssens, K. Tytgat, M. Vanden Bempt.*
*temo:* Analizado de lingvo-lernolibroj

Kriterioj por analizi lingvan lernolibron:





"Stafeto"-serio prezentas:

## Ĉu rakonti novele?

**Johán Valano**

Preskaŭ ne necesas reklami tiun ĉi libron.
Dek unu mallongaj rakontoj krimaj, en kiu Jano Karal, la valana detektivo, en profesie lerta kaj lingve klara stilo, solvos saman kvanton da fiaj krimoj.
Eĉ al komencantoj oni povas demandi: Ĉu legi senhalte?

**Ĉu rakonti novele?** 144 paĝoj, 370 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.




**antaŭulo de l' "Stafeto"-serio:**

## Jaĥto veturas for... kaj veturigas la **morton**

**Deck Dorval**

"Mi kore invitas vin al agrabla surmara vojaĝo, enŝipe de mia privata jaĥto 'Marfalko'..."
Ĉu vi kredus ke tia mesaĝo ekmovigas aventuron en kiu komplika krimo estas solvenda? Laŭ la tradicio de la plej bonaj krimromanoj, Deck Dorval rakontas neverŝajnan historion.

**Jaĥto veturas for, kaj... veturigas la morton** 190 p., 340 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



## *Ŝanco por Feliĉo*

Se pezas la vivo sur viaj ŝultroj; se vespere, vi volas kviete ripozi kaj iomete pripensi vian situacion; se vi serĉas ŝancon por esti feliĉa eĉ dum malfacila vivo, la plej sukcesa libro de Phil Bosmans, tradukita jam en 14 lingvojn kaj eldonita en 3 500 000 ekzempleroj, helpas vin.

96 paĝoj. Broŝurita. Prezo: 395 BEC + afranko. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

1) Enhavtabelo: Kontrolu ĉu ĝi estas klara kaj ĉu ĝi bone informas pri la vera enhavo de la libro. Tio estas tre grava por la sekvantaj kriterioj. Ekzemplo de bona enhavtabelo: *La Komencanto.*
2) Morfologio: Kontrolu per la enh.tab. ĉu la libro sisteme kaj laŭŝtupe pritraktas la bazan morfologian gramatikon, t.e., simplajn finaĵojn (-o,-a,-j,-n,-as, -is,-os,-us,-u, tabelvortojn, pre- kaj sufiksojn kaj participajn finaĵojn). Elektu laŭhazarde iun ĉapitron, (elektu ne nur komencajn ĉapitrojn, ĝenerale tiuj estas la plej bonaj el ĉiuj lernolibroj!!)kaj ekzamenu ĉu la traktado de la koncernitaj gramatikaĵoj plaĉas al vi. Ekz. de bona morfologia traktado: *Saluton, Teach Your Self Esperanto* (nova eld.1988), *La Komencanto.*
3) Sintakso: Gi koncernas la frazojn. Malmulte da esperantaj lernolibroj traktas la sintakson sisteme. Tamen kontrolu laŭeble ĉu la frazoj estas en la komenco facilaj kaj ĉu ili iom post iom komplikiĝas. Ekz. de malbona lernolibro pro jam malfacilaj frazoj en la unua dialogo(!): *Nuevo metodo de Esperanto* (por hispanolingvanoj). Same malbona, kontraŭe pro la daŭra facileco de la frazoj: *Junulkurso* (por franclingvanoj, tre uzata de en Afriko kaj en SAT-medioj).
Tiuj tri estas la tradiciaj kriterioj. En la lastaj jardekoj aldoniĝis novaj.
4) Situacioj: Cu la lernolibro sisteme enkondukas diversajn situaciojn pere de dialogoj? (En la stacidomo, en la bazaro, ktp.) Ezkemplo: *Teach Your Self Esperanto* (nova eldono de Sullivan), BBC-radio-kurso.
5) Desegnaĵoj: Cu la lernolibro enhavas ilin? Ili devas servi por plilarĝigi la kuntekston al la lernanto. Ornamaj desegnaĵoj ne estas vere bezonataj. Ekzemplo: *Eo programita* enhavas nur tiajn. *Metodo 11* (por franclingvanoj) uzas la desegnaĵojn por akompani la tekstojn. Sed ili estas tro malgrandaj, kaj nur kompreneblaj post legado de la teksto!! Por vidi ĉu desegnaĵo estas bona, kovru la tekston kaj klopodu mem verki pri la situacio kiun ĝi aludas. Komparu poste kun la enlibra teksto, ĉu estas esencaj diferencoj. Tiuj de *Metodo 11* estas malbonegaj. Tiuj de *Saluton* estas tre bonaj.
6) Niveloj de lingvouzo: Pristudu ĉu la lernolibro aplikas diversajn lingvouzojn: dialogoj, leteroj amikaj kaj oficialaj, ĵurnalstilo, radionovaĵoj, televidstilo, priskribstilo, literatura stilo ktp. Tio mankas en la esperantaj lernolibroj. Nur *Gerda malaperis* de Piron, uzas diversajn lingvouzojn en sia romaneto.
7) Vortofteco: Lastatempe ekestis modo paroli pri vortofteco je instruado de lingvoj. Ni ankaŭ ne eskapis al tio. Tamen tre grava afero. Cu la vortprovizo en la lernolibro sekvas iun videblan skemon je vortofteco aŭ ĉu ĝi estas laŭhazarda? Ekz: *Gerda Malaperis* estas grava sukceso ĉi-kampe post la unuaj provoj jam en la jaroj 30: *Verda Koro, Petro*, ktp. *Gerda* estas rekomendinda verko kiel unua legaĵo! Alia: *La zagreba metodo.* Tiu tamen restas sub la nun de FEL postulata nivelo (nur 400 vortoj).
8) Fonetiko: Tiu estu lasta nepraĵo por bona lernolibro. Kutime lernolibroj donas la elparolon de la esperantaj literoj (fonemoj) nur en la komenco. Kaj tio estas ĉio. Estontaj lernolibroj devus havi en ĉiu ĉapitro fonetikan anguleton en kiu ili kontrastus laŭŝtupe la diversajn fonemojn. Ekz, */s/* apud */z/*, */ŝ/*, apud */ĵ/*, ktp. Kompreneble kun parolaj ekzemploj.
Jen ekzemplo por montri kiel malbone statas la afero, ĉefe en landoj kie la lingvo havas aliajn fonemojn ol Esperanto. Dum la lasta Internacia Festivalo en Trier (FRG) estis japano. Lia gastiganto rakontis ke je sia alveno al Eŭropo, parolante pri *hundo*, li diradis *fundo* ktp. en tute nekomprenebla lingvaĵo. Tiu japano estis lerninta Esperanton per tradicia lernolibro kaj kun instruisto!!

Alex Humet montris poste modelan lernolibron *(Digui Digui)* verkitan en Katalunio kun subvencio de la kataluna registaro kaj laŭ la gvidlinioj de la Eŭropa Konsilio. Gi tre bone kunigas ĉiujn priparolitajn bezonojn. La materialo ampleksas lernolibron, specialajn tv-programojn, aŭdobendojn kaj ĵurnalajn rubrikojn. Kaj por ĝi kunlaboris dekoj da profesiuloj. Imitinda, sed ĉu imitebla laboro en Esperantujo.

Noto: Estus bone havi por nia Manlibro analizon, laŭ tiu metodo de la plej konataj lernolibroj por helpi al estontaj instruistoj. Gerrit Gerritsen jam faris iom da laboro en NL. Kiu volus ankoraŭ kunlabori? Pri legolibroj: Mi volas produkti liston de uzeblaj legolibroj por la unua kaj la dua jaroj de instruado. Por ĉiu libro ni devus fari resumon por la instruisto kaj listigi ĉiujn vortojn novajn (kun nenerlanda traduko) por faciligi la taskon de la legantoj kaj instruisto. Cu estas kunhelpontoj? Anonciĝu al Alex Humet.

*Grupo 3: gvidis Audrey Childs-Mee*
*partoprenis: H. Falk, K. Lodor, R. Rotsaert kaj G. Van Damme.*
*temo:* Pedagogia asisto al instruistoj de Eo

Kiel asisti ĉe novbakata instruisto?

Plej grava estas memfido. Do, kiam agnoskita instruisto (asistanto) akompanas novbakitan, li neniam intervenu dum la leciono eĉ se tiu perdis la vojon. Kion fari? Tiu mem retrovu ĝin. Maksimume li delikate interrompu se estas nepre necesa. Krome metodo taŭga por unu ne taŭgas por alia. Asistanto havu bonan rilaton kun instruisto.

Kritiko: Asistanto estu preta kritiki, sed ĉiam positive.

Preparado de la kurso: Akompana instruisto ankaŭ helpu prepari la kurson.

Pedagogia antaŭpreparo: Novaj instruistoj sin preparu. Ni rekomendas la D-kurson (oficiala belga pedagogia kurso, ĝi daŭras 2 jarojn) (Ivo Durwael: Tio ne estu deviga afero. Ni organizu mem pedagogiajn studotagojn. Per bone organizita seminario ni povas lerni pli ol dum du jaroj de oficiala studo. Kaj vi mem, Roland diris ke via D-kurso kiun vi sekvas estas tre malbona!)

Invito al spertuloj:Ni ankaŭ povus inviti spertulojn, ekz. Dennis Keefe, kiu baldaŭ eklogos en Francio. Li prezentu modellecionojn je diversaj niveloj por elstarigi didaktikajn erojn. Ekzemploj:

Baza nivelo ________ akuzativo de direkto
Meza nivelo ________ kompleksaj frazoj
Supera nivelo ______ historio - kulturo

Vidbendoj: Ni surbendigu tiajn modellecionojn por estontaj instruistoj.

Regulareto: Jen kelkaj ideoj por estonta regularo.
1. Estu minimumo de observitaj lecionoj.
2. Instruanto montru sian lecionskizon al asistanto. Eventuale kunpreparu la lecionojn.
3. La asistanto devas fari, se necese, rekomendon ke la staĝo estu plilongigita devige.

ALDONAĴOJ

*1. Raportetoj de instruistoj*

Jenaj instruistoj sendis raport(et)on:
*H. Dossche, P. De Smedt, G. Pirlot kaj E. Symoens.* Koran dankon al ili ĉiuj.

Ni listigos ĉi-sube kelkajn el la ĉefaj ideoj en la raportoj, kiuj ne estis menciitaj dum la studotago.

H. Dossche:

Generale: Mi uzas *La komencanton.* Mi ne scias, mi eĉ tre dubas, ĉu mi havas bonan instrumetodon.
Mi ne kapablas adapti mian nivelon al la diversaj niveloj de la kursanoj.
Kursoj:Ju pli longe la kurso daŭras, des pli multe da kursanoj malĉeestas, t.e. ĉiam la samaj: la malplej kapablaj.
Kial oni donu la saman kurson en tuta Flandrio?. La celo estu: doni la tutan gramatikon + ekzercojn + taskojn. Je la fino, la kursanoj minimume kapablu kompreni, legi kaj traduki.
Instruanto: Li devas ŝati la instruadon, esti entuziasma, havi tempon. Li ne estu pagata.
Loko: Kiel eble plej multe en "oficiala" loko. Tio donas iom da distingeco al la kurso.

Petro De Smet:

Generale: Esperanto estas ĉies kaj nenies posedaĵo. Neniu povas alproprigi al si decidpovon koncerne kursojn, agadojn aŭ ion ajn en tiu senco.
Atingi per tio (per la organizado de la kursoj) ke la netaŭguloj ĉesigu sian agadon estas plej ofte iluzio.
Diversaj kursoj DEVAS ekzisti. Diversaj opinioj havas la rajton 'koekzsiti' (por paroli france).
Laŭ mi logike, la unua demando kiun oni devas starigi estas: 'Kiam oni povas diri ke kurso estis sukcesa?' Aŭ eble antaŭ tio jam: 'Kion ni volas atingi?' kaj al tio la respondo devus esti: ke la kurso estu sukcesa. En tiu momento, se la kurso estas sukcesa, tiam la demando pri la maniero de instruado, pri la enhavo kaj daŭro de la kurso, k.t.p., pri la kosto de la kurso, plu havas neniun, absolute neniun, gravecon!!!
Miaj kriterioj:
1. Oni ne perdu lernantojn (nombro de ekzameno estu egala, aŭ prefere pli alta, al nombro en tria leciono.
2. Ili aktive konu ĉirkaŭ 1500 radikojn + la tutan gramatikon + perfekte la korelativojn.(Cetere,tiam ankaŭ ne plu estos bezonataj tiuj drakoj de 'daŭrigaj kursoj'!)
Kontrolo: Kion entrepreno aŭ movado nepre bezonas, kaj ĝenerale ne havas estas: iu Sinjoro 'Konscienco'. Devus esti iu kiu daŭre kontrolas ĉu la belaj promesoj, kaj belaj intecdeklaroj, kaj decidoj (!!!) de ĉiuj kunvenoj kaj studotagoj, kaj strarkunvenoj k.t.p. ankaŭ iel ajn efektiviĝas. Tio ŝpariĝus multe da energio. (Fakte ĝi estas la tasko de iuspeca ĝenerala sekretario).
Facileco: Ĉu Esperanto estas facila aŭ ne??? Miaj ideoj estas troveblaj en miaj diversaj kursoraportoj. Ankaŭ la 'sekretoj' de miaj sukcesoj! (Postulemo, severeco, seriozeco! Precipe: postulemo!) Argumetoj: la homoj venas, el si mem, kun la intenco lerni ion, akiri scion, ne 'amuziĝi'!
'Sekvado' de la lernantoj: Ili (la gelernantoj) scias ke mi regule 'sekvas' ilin, kaj mi tre ofte skribas, dum la kurso, privatajn leterojn, apogajn, instigajn al la gelernantoj (ĉiu kurso kostas al mi pli ol kvin mil frankojn!). En ĉiu leciono ili ricevas aldonan materialon. Tre rapide cetere la kursanoj fariĝas iu familio. Jam de la komenco regas ia esperanta etoso, pro miaj rakontoj, poemoj k.t.p. (Tre malfacile por skribe klarigi.)
Daŭro: Pli ol 15 semajnoj ne necesas, aŭ eĉ ne utilas.
Novaj instruistoj: La unuan fojon kiam ili instruas mi eĉ neniam mem partoprenas (ĉeestas) por ke ili sentu liberaj.
Kostoj: Kvankam la kursoj en Lokeren estis senpagaj mi trovas ke estas pli bone postuli pagon de 1000 frankoj. Kial? Tutsimple ĉar la homoj ne aprezas aferojn senpagajn.
Metodo: Kiel mi uzas *La Komencanton* kaj *Auld*? Vidu raportojn!. Mi preferas *La Komencanto* ĉar ĝi plej taŭgas por mia 'metodo'. La plej bona metodo por Esperanto estas la gramatika. Oni vere agas absolute kontraŭ la logiko se oni ne faras tion!...(Fakte eĉ *Cseh-metodo* estas gramatika!!! Oni ne ĉiam 'vortigas la regulojn, aŭ ni diru: oni ne vortigas ilin laŭ la kutima maniero, sed oni 'sentigas' ilin, aŭ ilustras lude.)
Bedaŭrinde *La Komencanto* elĉerpiĝis. Mi esperas ke FEL transprenos! La t.n. anstataŭanto (*Praktika kurso de Esperanto - FLE*) estas multe pli malbona ol *La Komencanto!!!* Laŭ aspekto, kaj laŭ enhavo. Sola plibonigo: trakto de korelativoj, kio mankas en *La Komencanto.*
Al interesatoj: Al seriozaj interesatoj mi ĉiam estas preta detale klarigi mian 'metodon', kaj cetere ĉiu estas ĉiam bonvena en miaj kursoj... kaj povus helpi dum la 'konversacia parto'.

Germain Pirlot:

Antaŭrimarkoj: Mi ne estas instruisto de fremdlingvoj. Mi ne gvidas E-kurson.
Rimarkoj (senorde): Taŭgeco de lernolibro, aŭ de instrumetodo, dependas ĉefe de la instruisto.
Pri la lernanto: Ni neniam forgesu, ke E-lernanto NE estas devigata sekvi kurson, do, se ne estas intereso, li/ŝi facile foriras!
Endus: 1) Informiĝi kial la lernanto deziras lerni Esperanton.
2) Scii, kial li ellernos la lingvon.
3) Daŭre informi pri la ebla aplikado de Eo por la antaŭviditaj celoj, ne de la instruisto, sed de la lernanto.
Interesa kurso: La kurso estu interesa, ne por la instruanto, sed por la lernanto!
Movado: Alia celo -se ne estas la ĉefa, eĉ la nura an niaj kluboj- estas varbi por la E-movado; sekve parto de la kurso (c. la kvinono) estu dediĉita al diversaj informoj rilate al Eo, al E-medioj kaj al eblaj aplikadoj de Eo por diversaj

celoj. Dum la unua jaro tio povus okazi nacilingve, kaj en Eo dum la dua jaro.
Rim. Tio povus esti anstataŭigita per fotokopioj de 'dokumentoj' ĉerpitaj el Gazetara servo.
Kostoj: Kompetenta instruanto estu dece pagita por gvidi kurson.
Duobla avantaĝo de pagita kurso:
1) la lernanto ne facile forlasas la kurson por ne perdi monon.
2) la instruanto sentas sin morale devigata plibonigi sian kurson.
Diraĵo: Diraĵo de inspektisto pri fremdlingvoj: "Por lerni fremdan lingvon oni bezonas:
- trionon da intelegenteco
- trionon da laboro
- trionon da motivo
Sed la laboro estas proporcia al la motivo".

Edward Symoens:

Pri Internaciaj ekzamenoj: Mi kunsendas parton de la *provizora* materialo rilate al la Internaciaj Ekzamenoj, elementa kaj meza niveloj. Origine, ni nur pensis pri la meza nivelo, sed nun opinias ke ni devas produkti samtempe kaj kohere la elementan, la mezan kaj la superan nivelojn.
Estas ampleksa laboro, pri kiu ĉiuj membroj de la Pedagogia Komisiono de ILEI devas esprimi sian opinion. Ne forgesu, ke temas pri baza dokumento, uzebla en ĉiuj landoj de la mondo, en kiuj ne ekzistas tradicia ekzamensistemo. Pro tio la dosiero ankaŭ enhavos modelojn de aliĝiloj, de atestoj, de protokoloj, ktp. kvankam la esenca parto memkompreneble estos la priskribo de la postuloj por la diversaj niveloj + specimenoj por konkretigi la postulojn.
Pedagogia asisto de instruistoj: ILEI organizis en 1988 unuan kurson surbaze de la materialo de Irena Szanser. Tiu materialo estas sufiĉe ampleksa kaj malfacila. Ni antaŭvidas simpligitan version de ĝi, kiu estos multe pli praktika, konkreta konsilaro por komencantaj, neprofesiaj instruantoj, ĉar tia libro unuavide ne ekzistas nun.

*2. Prezento de modelkurso*

Alex Humet fermis oficiale la studotagon je la 5a kaj duono, kaj sekvis prezento de la kurso de Dennis Keefe fare de Alex.

*Partoprenis:*
*L. Schelstraete, M. Aerts, M. Grela, B. Boon, M. Vanden Bempt, Katja Lodor kaj A. Coppé.*

Dennis Keefe ellaboris kurso-materialon, *Baza Esperanto-Kurso*, dum diversaj kursoj en Madrido kaj Gresillon. Gi estis finpretigita en somero 1987, sed ne ankoraŭ eldonita.(Cu FEL volus tion eldoni?) La materialo estas tre konvena, ĉar per ĝi vi povas organizi kompletan kurson kaj ankaŭ vi povas uzi ĝin komplemente al via metodo kaj materialo.
Escence ĝi estas paroliga materialo kaj tre moderna el la vidpukto de instru-lingvistiko. Dennis ordigis laŭŝtupe ĉiujn instruotajn elementojn de Esperanto, kaj morfologiajn kaj sintaksajn. Por ĉiu ŝtupeto li produktis lecionon nur kun demandoj. La gelernantojn povas pluiri al sekva leciono nur se ili jam sufiĉe ekzercis parole la lecionon kaj nur se ili kapablas respondi nature kaj tuj sen rigardi la folion.

La parolekzercoj okazas laŭ jena skemo:
1) Post la instruado de la koncerna koncepto, la instruisto prezentas parole la demandojn al la gelernantoj, kaj helpas al ili kune respondi ilin. La gelernantoj nur aŭdas la demandojn.
2) Lernanto aŭ lernantino rolas nun kiel instruisto kaj faras la samajn demandojn al la samkursanoj rigardante la folion.
3) Ciuj gelernantojn ricevas la foliojn. Ili kunlegas la demandojn kun la instruisto kaj respondas.
4) La gelernantoj dividiĝas en grupojn po maksimume kvar. En tiuj rondetoj la gelernantoj rolas alterne kiel demandantoj kaj demandatoj, ĝis ili nature kaj tuj povas respondi.

Eble tiuj kiuj ne ĉeestis la demonstracion povas pensi ke la gelernantojn papage parkeras la respondojn. Tamen, tio ne eblas, ĉar ili ĉiam devas pensi por respondi ĝuste. Kio okazas estas jeno: tiu metodo aktivigas la cerboaŭtomatiĝon por lingvaj aŭdokompreno kaj parolrespondo. Kaj tiuj lastaj estas tre gravaj por "pensi" en nova lingvo.

Pliajn informojn vi povas ricevi de Alex Humet.

*3. Listo de valoraj instruistoj*

Jean-Marie Derzelle, Ghislaine Tilleux, J. Jacques, Vertongen, Marie Grela, André Coppé, Georges Sossois, Roger Destabelle, Freddy Bosmans, Lambertine Dreze, Dupont, José Jacobs, Philippe Van Damme, Dehaye.

*4. Listo de dokumentoj disdonitaj dum la studotago*

- Specimenoj de la elementa kaj meza ekzamenoj de ILEI en Rotterdam 1988.
- Specimeno de nova meza,ekzameno verkita de S.McGill.
- Programoj de la 2a kaj la 3a jaroj de la oficialaj Esperanto-kursoj en Antwerpen (Quellinstr. 31). (Instruistoj: Andre Staes kaj Chris Declerck).
- Provizora rezulto de la lasta enketo de FEL.
- Enketilo pri la studotago.

*5. Aldonaĵo al ĉi tiu raporto: La metodo 'Petro De Smedt', verkita de Ivo Durwael.*

## LA METODO "PETRO DE SMEDT"

Antaŭ unu semajno, mi vizitis la kurson de Lokeren sub la gvidado de Petro. Denove okazis la miraklo: la kurso komenciĝis kun 14 gelernantoj; 1 forfalis, 1 aldoniĝis ... kaj 14 faris la skriban ekzamenon. Ili jus finis ĝin kiam mi envenis. Ili faris ĝin sen antaŭaverto, ĉar la kurso daŭris ankoraŭ 2 pliajn semajnojn. Mi trarigardis la foliojn kaj evidente trovis erarojn. Sed fakte mi devis serĉi ilin. Iom post mia alveno, Petro (la ruzulo!) surprizis min per sciigo, ke li urĝege devis foriri, kaj petis min transpreni lian taskon dum 20 minutoj. Sen kono pri la programo, mi improvizis konversacion. Al mia simpla demando: "Rakontu ion pri vi", ĉiu laŭvice donis neatendite longan respondon: en kvaronhoro, mi vere ekscitis sufiĉe multe pri la lernantoj. Post iom da teorio kaj tradukekzerco, denove kun Petro, sekvis alia konversacio en grupetoj po 3, kun la helpo de kelkaj lernintoj de antaŭa kurso. La konversacio ege viglis, kaj mi aŭdis eĉ ne unu krokodilon!

Jam tre ofte mi parolis kun Esperantistoj pri la kursoj de Petro. Mi jam aŭdis amason da kontraŭargumentoj: konservi ĉiujn lernantojn, tio simple ne eblas; mia grupo da lernantoj estas tro malkohera; Petro estis bonŝanca, venontan fojon li ne plu tiel sukcesos; li havas apartan temperamenton, mi ne povus imiti lian manieron de instruado; ktp. Mi jam diversfoje ĉeestis iun lecionon en kurso de Petro, kaj mi povas aserti, ke li estas konstante bonŝanca pri la konservado de ege nekohera grupo. Ankaŭ ĉifoje partoprenis junuloj kun pensiumitoj, doktoroj kaj busŝoforo, kaj tamen ĉiuj restis kunaj en la sama etosplena kurso, kaj vigle konversaciis en Esperanto inter si. La temperamento de Petro ja estas unika. Sed tiuj, kiuj malakceptas la eblecojn de la "metodo Petro" ne jam komprenis ĝian esencon. La bazo de ĝia sukceso ŝajnas al mi la homa, varmkora ligo de la kursgvidanto kun siaj lernantoj kaj lia sincera zorgemo por ĉiel eviti seniluziiĝojn. La specifecoj de la kursoj de Petro estas facile dedukteblaj de tiu baza ideo. La lernantoj komencas kun la sincera espero por ekuzi Esperanton post proks. 15 semajnoj. La intenco estas serioza, sed baldaŭ venas la tentoj. Petro subtenas siajn lernantoj per severaj postuloj: lerni min. po 100 vortoj semajne, ĉiusemajna skriba testo pri la vortkono, preparo de traduklaboroj, kiu ne partoprenas dum 2 sinsekvaj lecionoj sen averto tuj ricevas afablan leteron por informiĝi ktp. La kursolibro, la dirajoj, la tono, la ritmo, la ŝercoj kaj la riproĉoj ne devas esti tiuj de Petro. Sed la konstanta zorgo por konduki lernantojn al nivelo pri kiu ili fieras, la kuraĝo por postuli ion ĝuste por atingi rezulton estas ja adaptebla al ĉies temperamento.

Fine mi volas ankoraŭ mencii, ke ne ĉiuj lernantoj de Petro fariĝas dumvivaj Esperantistoj. Sed jes trafis min, ke ili surprize multe partoprenas Esperanto-aranĝojn, enlande kaj eksterlande (tuta klaso en Zamenhoffesto en Gent, ĉiuj junaj kursanoj en Malle, ĉiuj kursanoj escepte de 1 en UK-Rotterdam ...): do sukcesa kurso ankaŭ postefikas! La 28-an de Januaro, 15 (dekkvin!) infanoj de kursanoj el Lokeren partoprenis kun siaj gepatroj unuan Infanrenkontiĝon. DEK TRI infanoj parkere deklamis po 1 aŭ po 2 Esperanto-poemetojn! Sen komento!!!

Ivo Durwael

P.S.: kiu ŝatas ricevi detalojn pri kurso de Petro povas ricevi kopion de raporto ĉe mi, aŭ rekte informpeti ĉe Petro De Smedt - Hemelstr 44, 9330 Dendermonde (tel. 052/21 26 77).

### STATISTIKO PRI ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ.

JAROJ (87) kaj 88

| MONATO | MENCIO | MALGR.ART. | GRANDA | RADIO+TV |
|---|---|---|---|---|
| Januaro | (0) 2 | (3) 3 | (2) 4 | (11) 0 |
| Februaro | (0) 3 | (6) 0 | (10) 9 | (4) 0 |
| Marto | (0) 4 | (7) 1 | (8) 2 | (5) 0 |
| Aprilo | (0) 6 | (4) 4 | (4) 2 | (0) 0 |
| Majo | (0) 5 | (6) 3 | (0) 3 | (0) 0 |
| Junio | (0) 1 | (9) 4 | (7) 5 | (2) 0 |
| Julio | (0) 4 | (8) 4 | (3) 5 | (0) 0 |
| Aŭgusto | (2) 0 | (11) 4 | (3) 6 | (0) 1 |
| Septembro | (3) 1 | (7) 2 | (8) 4 | (3) 1 |
| Oktobro | (7) 3 | (11) 5 | (4) 3 | (1) 0 |
| Novembro | (0) 1 | (2) 2 | (3) 1 | (0) 0 |
| Decembro | (14) 1 | (0) 0 | (9) 2 | (3) 2 |
| SUMOJ | (26) 31 | (74) 31 | (61) 46 | (30) 4 |

INFORMA LABORO DE FEL EN (87) KAJ 88.

ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ:

| | | |
|---|---|---|
| Mencioj en gazetaro | (26) | 31 |
| Malgrandaj artikoloj (unu kolumno) | (74) | 31 |
| Grandaj artikoloj | (61) | 46 |
| Radio kaj televizio | (30) | 4 |
| Totaloj | (191) | 112 |

SKRIBAJ INFORMPETOJ EN LA CENTRO (telefonaj ne jam estis registritaj):

| | | |
|---|---|---|
| Peto pri unua informbroŝuro | (28) | 66 |
| Provabono Esperanto Panorama | (82) | 41 |
| Ampleksa informpakaĵo | (31) | 22 |
| Informoj tag- + vesperkursoj | (50) | 66 |
| Kursoj por aŭtodidaktoj | (14) | 9 |
| Aliaj demandoj | | 9 |
| Totaloj | (205) | 213 |